

esperanto USA

1993(4)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

Making News This Issue

Ido

86 years ago the Delegation for the Adoption of an International Language triggered off a firestorm in the Esperanto world by recommending the project of an anonymous "Ido." What lay behind this and what resulted from it? Reg Reid and Rob Hardy tell all here.

See Page 7-9

William H. Schulze

We have lost one of the long-time pillars of the American Esperanto movement. In the next issue we'll have details on Bill Schulze's life and impact, but we have a preliminary assessment in this issue.

See Page 10

Supporter of Esperanto

Umberto Eco is now indicating his support for Esperanto as a solution to the language problem, but he is not the first linguist or philologist to take this stance.

See Page 13

In This Issue:

Communication 2

Language in the News 11-13

Recenzoj—Gerda+ 14

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

Instructional Videotape

Let's Do It!

by Lucille Harmon

Although our original plan to film a direct-method Esperanto video series with Audrey Childs-Mee died with the unfortunate and premature passing of Audrey, the desire to have a video instructional series has not died. Interest continues to grow. We have held numerous enthusiastic "brainstorming" sessions at ELNA conventions, NOREK, TKEK, SFSU, and even international discussions during our post-UK excursion in Spain and Portugal.

We have come up with and then eliminated lots of ideas which are good, but not feasible; have suggested the prime target for such a series; and have shown that there is great interest and desire to embark on such a video series both here and in Europe.

What is not feasible:

1. Use of any now existing course as the basic written material or even framework for a video series.
2. A multi-thousand-dollar project like French in Action. Such an expense is not possible nor is it needed. Using only the foreign language to teach that language is a waste of time for instruction of Esperanto, because Esperanto is far more logical and easily explained than any national language.
3. Use of non-Esperantist actors who would learn Esperanto on screen.
4. Esperantists who would act out a whole drama around which lessons are built. Numbers 2,3, and 4 are too expensive and, even more important, too limit-

ing as to a time frame within which the project would be completed. Filming of our project should start in 1994, but should certainly be capable of being edited and added to over at least a couple of years.

5. Cartoons which show animation by thousands of individually-drawn scenes or by electronic manipulation, which apparently would be even more expensive than paid actors although less limiting as to time frame on flexibility for change.

6. Developing a number of video series directed to different audiences and/or to the general public is beyond our reach. We must at this time concentrate on one general audience, the consensus being *junior high school-college levels*. The tapes would be useful for secondary and college teachers and local clubs.

What is feasible:

A video series starting with ten and eventually growing to twenty half-hour lessons augmented by written text and tapes to be used to help provide more description of instructional points and built-in time for the student to repeat the phrases being used.

The text should have a framework allowing for a teacher (young and attractive, of course) and a few students, possibly extended family members, seen in a study situation (at least at first) but have real-life experiences as the basis for improving their rapid growth in the use of the international language. I envisage the use of a real teacher and hand puppet students (with distinct personalities) who

Daŭrigota sur paĝo 15

EDITORIAL

COMMUNICATION

One of the basic traps into which most designers of constructed languages have fallen is in seeing the goal of an International Language as an end in itself. As Zamenhof knew, the purpose of Esperanto is not Esperanto; the purpose of Esperanto is communication. This is a point that many of us too often forget.

But communication is not only important as our ultimate goal; it is important to us as a tactical tool in our promotion of Esperanto. If we don't communicate, we can't work together. If we do communicate, we can work wonders. That's why I want to spend a few hundred words talking about two ways in which we in ELNA should be communicating.

Electronic

I spent some space talking about electronic communication last issue, and won't take up much here. I just want to indicate, for those with net access, three services that ELNA will be implementing over the next few months.

(1) ELNA is going to establish an anonymous FTP (File Transfer Protocol) site at its Netcom account. For those who don't know, an anonymous FTP site is a repository for documents and other files, accessible by anyone with E-mail capability. It has not yet been decided what documents will be deposited there, but at a minimum they will include ELNA's book catalog, the contents of *The ELNA Update*, selected articles from *esperanto usa*, Derk Ederveen's international E-mail address list, Michael Urban's Frequently Asked Questions document, and Martin Weichert's Esperanto Yellow Pages. Local groups may also keep materials of general interest there. This should be in place early in January.

(2) ELNA is going to establish a rapid-reaction mailing list. The list will be used to advise active promoters of Esperanto of situations that require quick reaction (e.g., a mention of Esperanto in a widely read newspaper). We've already seen the utility of this ability with the recent exchange of opinions in *New York Magazine* (coordinated on the net) and the letters in *PC Week* (coordinated by fax). We hope to have this in place by the end

of January.

(3) The Central Office of ELNA is going to begin a weekly one-hour network conference session on Internet Relay Chat channel #elna. The Director of the Central Office will be on-line to discuss any questions or problems you might have; I expect to join him once or twice a month from my workplace, and I hope that one or two more Estraranoj will also join us. (Note: this will be different from the general international discussion, in Esperanto, carried on over channel #esperanto on Mondays and Tuesdays.) This should be happening by the end of February.

Once again, ELNA's E-mail address is elna@netcom.com. For those who have fax (as well, or instead), ELNA's fax number is (510) 653-1468.

Paper

Yesterday I received the latest issue of the Chicago Esperanto Society's *Saluton!* and found, to my dismay, that they are hunting a new editor.

In the last year or so several local Esperanto bulletins have improved considerably, in appearance and content. The trend, which seems to be largely due to the widespread availability of desktop publishing facilities, started with Jim and Nancee Medrano at the Esperanto Society of New York's *Novjorka Prismo. Saluton!*, which had disappeared for some years, was taken over by Doug Portmann and reappeared in its new, information-full form. Richard Horn, with the help of Sid Culbert, has considerably upgraded the Seattle Esperanto Society's bulletin *Ĉiam Verde*. Arnold Langberg deserves a big hand for what he has done over the past year with the New England Esperanto Society's *Verda Lumo*. And, most recently, John Cunningham's technical expertise has done wonders for the appearance and content of the San Francisco Esperanto Society's *SFERiĵo*.

I personally believe that the quality of a local bulletin plays a significant role in the development of the group that issues it. The bulletin, after all, is the primary service that many of the members receive for the money they pay in dues. A group

with a poor bulletin or no bulletin at all will hold on to faithful long-time members ... for a while, at least, until they gradually move away or forget to pay one year's dues and drop out of the movement. A group with a good, attractive, informative bulletin will not only hold on to its old members, but attract new ones as well.

The quality of a local bulletin depends upon two factors: (1) the editor; and (2) the members of the group. For the first, the group needs someone who has (a) a fairly good knowledge of Esperanto, (b) the technical resources to produce an attractive bulletin, and (c) the necessary motivation to give the production of the bulletin a high priority. For a small group, finding someone who satisfies all three of these criteria is not going to be easy, and the groups mentioned above are lucky to have found the Medranos, Doug Portman, Richard Horn, Arnold Langberg and John Cunningham. How long they can hold on to them, and whether they can be replaced when this becomes necessary, is another matter.

Theoretically, the editor's job is to receive, edit, and place articles and information in the bulletin. In practice, the editor will often be left with a choice: publish a one-page bulletin giving nothing but the date, time and place of the next meeting; or fill up lots of space with his/her own writing. For the first, you don't really need an editor, just somebody willing to fill out postcards. For the second, people will eventually get bored with a bulletin that's a reflection of one person's ideas. Both problems can be resolved if the group's members are willing to make a little time to contribute to the bulletin themselves. I hope that every member of ELNA reading this editorial who is also a member of a local group will consider this point.

In a way, *esperanto usa* is like a local bulletin. And, like local bulletins, it sometimes finds it necessary to change its editor. Now is such a time. Several members have suggested to me that it is not

Daŭrigota sur paĝo 5

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

In an article on Hollywood's current problems, Newsweek (Mar. 1, 1993) notes that "the guys greenlighting projects are looking for sure-fire international fare, top-heavy with thrills, that will play in any language. Which is why [Arnold] Schwarzenegger, [Sylvester] Stallone and [Jean-Claude] Van Damme, who speak the Esperanto of action, are the kings of the new global hill." [Editorial comment: anyone who has listened to a monolog by Sly Stallone will realize that he speaks the *Volapuk* of action.] (sent by Gene Keyes)

Susan LeBlanc, Staff Reporter for the Halifax, Nova Scotia, *Mail-Star* (June 9, 1993), describes Esperanto and the activities of the Esperanto group in Halifax, quoting from local Esperantists Kim Keeble, Mary Jo Graca, and Dr. Stevens Norvell, whose 1,600-book Esperanto library is believed to be the largest in North America. (sent by Gene Keyes)

Ken McCutchan, in his column "Old Tales Retold" in the Evansville, IN, *Courier* (Aug. 22, 1993), tells about "an amazing [Evansville] child named Winifred Sackville Stoner." Winifred, a child prodigy, by age 8 "was able to converse in five languages: English, French, Spanish, Latin and Esperanto," and furthermore, by age 14, she was traveling in Europe, "where she lectured on Esperanto."

Under his own byline, Storrs Esperantist Arland R. Meade describes his experiences at the 1993 World Esperanto Congress in Valencia, Spain, in a feature article "Watching Esperanto in action" in the Willimantic, CT, *Chronicle* (Sep. 2, 1993). The article, filling two wide columns, goes into detail about what goes on at a World Esperanto Congress. (sent by Arland Meade)

In a letter decrying the U.S. boycott of Cuba, published in the Hartford, CT, *Courant* (Sept. 14, 1993), Arland R. Meade uses U.S. government refusal to permit U.S. citizens to visit the 1990 World Esperanto Congress in Havana as an example of a situation in which we were made "the joke of the world." (sent by Arland Meade)

"Speaking a common language" is the title of a long and informative "Lifestyle" feature by Gena Asher, Staff Writer for the

Bloomington, IN, *Herald-Times* (Sep. 21, 1993), about Esperanto, "a simplified tie that binds." The article quotes extensively from local Esperantists Jon Liechty, Raymundo Morado, and George and Mary Neumann; it also includes a two-column photo of Liechty, Morado, the Neumanns, and Mark Armantrout. A sidebar includes ELNA's address. (sent by Jon Liechty)

Steve Jobs, who once referred disparagingly to UNIX as "the Esperanto of operating systems," was obviously wrong. Aaron Goldberg, writing in *PC Week* (Sep. 27, 1993), expects Microsoft Windows NT "to become an Esperanto-like common element among many different hardware architectures." Well, hopefully its luck will be better than that of Esperanto, which "was a failure in that no one learned it..." (provided by the Central Office)

The cover of the magazine *Library Journal* (Oct. 1, 1993) shows a picture of Elizabeth Martínez, Los Angeles Public Library City Librarian, sitting beside the front steps of the new L.A. Central Library. The steps are covered with words in a number of languages, some of which ("kaj la nuna Esperanto") look extremely familiar. (sent by Maya Kennedy)

A one-column article on the front page of the Montessori Bulletin Board (Oct. 1993) encourages the teaching of Esperanto and provides ELNA's 800 number as an additional source of information. (sent by Thomas Kloecker)

In answer to Aaron Goldberg's comments about Esperanto (see above), *PC Week* (Nov. 1, 1993) published a set of three letters from Komputila Rondo Director Jurgen Wulff, ELNA President Don Harlow, and ELNA C.O. Director Michael J. Sloper pointing out the utility of Esperanto not only in the everyday world but in the world of the information superhighway as well. (provided by the ELNA Central Office)

In Donna Read and the Canadian Film Board's documentary "The Goddess Remembered," broadcast on San Francisco's PBS station KQED (Nov. 29, 1993), a voice in the background at a museum in Crete can be heard shouting the languages in which

information is available—"English, Deutsch, Español, Swahili, Esperanto!"

For the second time in 1993, the popular television quiz show *Jeopardy* (Nov. 30, 1993) provided an entire category devoted to Esperanto, this time as part of a tournament for the most successful participants of the past ten years. "Esperanto" was the sixth category in the "double jeopardy" segment, and all questions were answered correctly, including one asking for the meaning of *akvoskiado*. (reported by David Jordan, Arlyn Kerr, John Massey, Cornelius McKown and Derek Roff)

Hewlett-Packard's manual *A Guide to Using Color*, p. 12, shows a sample pie chart with the Esperanto caption "maljuna sed bona." (sent by John Mathews)

In popular fantasy author Terry Pratchett's novel *Witches Abroad*, one of the characters, Nanny Ogg, "babbled on ... in her very own esperanto" to communicate with foreigners. (sent by Matthew Horton)

In John Barnes' science-fiction novel *Orbital Resonance*, Esperanto plays a significant role, being one of the four official languages of the surviving portion of the human race.

In Grant Naylor's novelization of the TV series *Red Dwarf* (see previous "Newsbriefs" columns), a man and a hologram pass part of their time in space after the extinction of mankind learning Esperanto. The hologram humorously mistranslates Esperanto to English. (sent by Matthew Horton)

The book *A Mouthful of Air* by Anthony Burgess (perhaps best known as the author of *A Clockwork Orange*) devotes a page to the creation and early development of Esperanto. Burgess's opinions of Esperanto as a language do seem to be slightly conditioned by the assumption that the practices of his native language mark the zenith of linguistic evolution, but then this is not too unusual... (sent by Maya Kennedy)

Harley Hahn and Rick Stout's new book *The Internet Complete Reference* (highly recommended to anyone who intends to get on-line, by the way), in a chapter on "Anonymous FTP," refers twice to a file called *esperanto-faq* (p. 317).

George Partlow of Alaska has provided the editor with a xerox copy of a glossy marketing brochure for Software AG's new graphical query and reporting tool *Esperant*.



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

CALIFORNIA

Ĉiun aŭguston, membroj de kampusaj grupoj specialaj ĉe Universitato de Kalifornio, Berklio, disdonas informojn pri tiuj organizoj al interesatoj ĉe tabloj en la centra placo, nomata "Sproul". Ĉijare, s-rino Minĉi Ĉien, vicprezidanto de la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj (LOGE), kaj instruistino vizitanta en la fako lingvistika, okazigis tian tablon por sia kurso Esperanta en la t.n. DE-Cal programo. S-rino Ĉien menciis, ke la kurso iutempe allogis 20 klasanojn, "multe da homoj por tiu ĉi kurso". Ŝi daŭris, "Mi estas tie ĉi por (espereble) sciigi homojn pri la ekzisto de la kurso."

Okazigis LOGE la unuan (kalifornian) Senkrokodiligan (Duon)Semajnfino la 15an de majo. Ĉeestis 23 lokaj geesperantistoj kaj unu neatendita eksterregiona (fakte eksterlanda) gasto. La konferenca temo estis "La internacia uzo de Esperanto".

SFERO (San Franciska Esperanto Regiona Organizo) septembre gastigis siajn plej novajn membrojn, familio el Siberio: Aleksander kaj Irina Shlyfer kaj iliaj gefiloj Svetlana kaj Sasha. Ili ĉiuj flue parolas Esperanton.

La Esperanto-Asocio de Sakramento (ESOS, Esperanto Society of Sacramento) en majo partoprenis la tritagan Whole Earth Festival (Tutmondan Feston) ĉe kampuso de Universitato de Kalifornio, Davis (proksime de Sakramento). La membroj disdonis edukajn informojn kaj respondis demandojn pri Esperanto. Kvindek kvar fest-ĉeestantoj petis pli da informoj perpoŝte.

ESOS sukcesis allogi la 1994-an jarkongreson de ELNA. Dum la 1993a kunveno en Hartford, ELNA-anoj voĉdonis okazigi la venontan kongreson en la ĉefurbo de Kalifornio. Membroj de ESOS nun devas decidi pri kongrestemo. Jam sugestitaj kiel temoj estas "Usono kiel Esenca Ero de Esperanto en la Mondo". Alia sugesto: "Venu, Vidu, Ridu: Amuziĝu Inter Ni".

CONNECTICUT

Printempe stariĝis Esperanto-klubo en mezlernejo en Guilford, CT. Kelkaj membroj partoprenis la someran kursaron

Esperantan ĉe San Franciska Ŝtata Universitato. La prezidanto de GEKO estas Daniel Cuthbert. Oni povas kontakti la klubon jene: **Guilford Esperanto Club, c/o Guilford High School, New England Road, Guilford, CT 06437.**

Freneza somero estis por la Southern New England Esperanto Society, kies bulteno SNEES (prononcita, estas vortludo ĉar samsonas al la angla vorto por "terni"), priskribas ne nur la ĉiujarajn somerajn Esperanto-kursojn ĉe Universitato de Hartford, sed ankaŭ la ĉi-jaran ELNA-n kongreson. En la kursaro instruis William Orr el Novjorko, Zdravka Metz kaj Normand Fleury el Montrealo, kaj Spomenka Ŝtimec el Zagrebo, Kroatio. SNEES ankaŭ raportas, ke kelkaj priesperantaj artikoloj aperis en gazetoj novanglujaj dum la printempo kaj somero.

DISTRICT OF COLUMBIA

Raportas *La Potomaka Esperantisto* (bulteno de la Esperanto-Societo de Washington): **ESPER-KANTOJ:** Allahina Russel gastigis membrojn por vespero de Esperanta kantado ĉe sia hejmo en Silver Spring, Maryland, la 26an de junio. Partoprenantoj alportis (kiel eble) muzikajn instrumentojn kaj, kompreneble, entuziasmajn voĉojn. **HISTORIAN PERSPEKTIVON:** Dum la aprila kunveno, D-ro Roberto Brown prelegis pri siaj memoroj pri la Esperanta movado en Vaŝingtono ekde kiam li unuafoje membriĝis en 1948. D-ro Brown raportas ke en tiu epoko la plimulto da membroj ĝuis babili pri la *ideoj* de Esperanto kaj interlingvistiko, sed malmulte parolis Esperante. D-ro Tom Goldman ankaŭ kontribuis plurajn memorojn pri tiu epoko, precipe pri la EANA/ELNA disigo kaj la batalado pri tio. **UZBEKIA AMIKO:** Andrei Kolganov, kiu estis gasto en Vaŝingtona regiono en februaro, revenis tien por pasigi la someron tie. Li studis neprofitcelajn organizojn, inkluzive de la Esperantic Studies Foundation.

ILLINOIS

La septembra numero de *SALUTON*, la monata bulteno de La Esperanto-societo de Ĉikago, raportas pri vigla programo kluba por antaŭenigi la instruadon de Esperanto. La klubanoj decidis, ke ili necesis varbi ambasadoron, kiu vizitus lernejojn kie

intereso pri Esperanto ekzistas. D-ino Gertrude Novak konsentis, kaj jam vojaĝis al Milwaukee kaj Sheboygan, WI; Gary kaj Angola, IN; Bowling Green, KY kaj Hudson, OH; Boulton, CT; Brattleboro, VT; kaj Elmhurst, IL. Baldaŭ ŝi iros al St. Louis, MO; Emporia, KS; kaj Leavenworth, KS. Ankaŭ, la societo kontaktis instruontojn en Illinois kaj najbaraj provincoj. D. Dietsch (Ft. Leavenworth, KS) kaj L. Jackson (Ft. Scott, KS) havis nur 2-monatan preparon, sed nun la studentoj kaj iliaj gepatroj estas entuziasmaj pri Esperanto. La societo subtenas ilin per telefonvokoj, taŭgaj informiloj, kaj instigo al fremdaj Esperantistoj sendi salutojn.

IOWA

Mark Lambert, de la Iowa Esperanto-Ligo, proponas starigi novaĵleteron por la grupo. En letero al Darlinjo Evans, li emfazis kiel grave estas, ke loka grupo eldonu bultenon, speciale en provinco kiel Iowa kie ne multegas Esperantistoj kaj tiuj estas dise. Li proponas sendi la novaĵleteron ne nur al membroj, sed ankaŭ al interesuloj (de la listoj ricevitaj de ELNA). Aliaj agadoj kiujn menciis Mark en sia letero: D-ro Novak intervjuiĝis ĉe radio-stacio en Des Moines; Darlinjo Evans instruis Esperanton ĉe Bahai'ia somera lernejo; Mark mem prelegis pri Esperanto al junulgrupo en Des Moines.

MICHIGAN

La Rikoltanto, informilo de la grupo Cerealurbaj Esperantaj Amikoj (Battle Creek, Michigan), aperigis interesan artikoleon "Pri Supersignoj en Skribado kaj Presado", pruvante ke tiu ĉi problemeco ne estas nova (la artikolo citas kelkajn elĉerpojn de fruaj numeroj de *La Esperantisto* kaj *La Revuo*. *La Rikoltanto* celas "disvastigi la opiniojn de ĉiuj seriozuloj kaj reaperigi gravajn artikolojn, sciigojn, ktp."

Miĝaelo Larkin, prezidanto de la Esperanto-Societo de Miŝigano, en la 43a numero de *Semanto* (kluba novaĵletero) petis al la membroj jene: "Nia sindona redaktoro bedaŭrinde ricevas ordinare nur malmulte da kontribuoj por ĉiu numero de nia novaĵletero. Por ke *Semanto* estu riĉenhava kaj kiel eble leginda kaj

Daŭrigota sur paĝo 9

EL LA CENTRA OFICEJO

Now is the season of giving.
Now is the time of the evergreen star.
Let us sow the seed of the Master's work.

Let us work to spread Zamenhof's gift to humanity.

Each book is a seed ready to sprout.
Each book should be given in season.
Help the Esperanto movement grow.
Help manifest peace through understanding.

Now let each help.

Although it is always an appropriate and effective method of disseminating information, I believe that now is the perfect time to donate Esperanto books to your local library.

In fact, I am herewith declaring a special price for a fine pair of books. You can donate both the famous introductory text *Learning and Using the International Language* by David Richardson, and the intermediate-level work *Step by Step in Esperanto* by Montagu Butler for the com-

bined price of only \$25.00. That's right—just twenty-five dollars, which includes tax and shipping! The normal price would be \$31.07, so you save 20%!

Simply send us the name and address of the library (or friend) you wish to be the recipient of this special pair of books and a check for \$25, and we'll do the rest.

This could also be a club project; perhaps your local club could put together some kind of fund-raising project which would place these books in several libraries.

This kind of gift is tax-deductible (if given to a library) so we would be glad to send you a letter for your tax returns, if you request it.

I would also like to remind you that books are in general among the finest and most welcome gifts which can be given. Browse through our catalog and imagine your friends' delight at receiving this book or that.

We would also be glad to arrange gift memberships in ELNA and/or UEA for

friends or relatives who are interested in Esperanto, but not yet deeply enough to commit to membership dues. Remember that youth membership in UEA costs only \$22, and this includes subscription to *Kontakto* in addition to the Jarlibro and the stamps which allow use of the UEA delegate network.

And do not forget the great need for books and supplies among Esperanto clubs in poor countries. Our contributions overseas are certain to bear fruit. I shall be financing a shipment of books to the Esperanto Association of Estonia, the country where my grandmother was born. We can arrange a package of books as a donation to the national organization of your choice in any amount.

I have here suggested several ways we can invoke our generous holiday spirit in service to our dear language movement. Perhaps you can think of yet other ways...

Now let each help.

Blessed be your holy-day season!

Miko Sloper

Daŭrigata de paĝo 2

exactly right for the president to also be editor of the association's organ. Since in almost every case such suggestions have come from people who have, in the past, showed that they do not agree with my particular philosophy as far as ELNA is concerned, and since historical precedent exists for a single individual to hold down both jobs (Bill Harmon was listed on the masthead of *The ELNA Newsletter* as editor for about a year during his tenure as president in the late seventies), I don't give these individual suggestions much weight in making a decision on this matter.

On the other hand, a person who has to work eight hours a day to feed his family, edit a national newsletter, and serve as


President of a growing national organization, is probably not going to do any of those three jobs well—and I think the last four months have served as a warning to me that this is, in fact, the case. Furthermore, I am on record as wanting to redistribute some of those hats that, in the past, have been stacked up four or five to a head for some of the major players in ELNA; for me to hang onto two such important hats as the presidency of ELNA and the editorship of *esperanto usa* would run counter to my own philosophy.

So I am now looking for someone who will be willing to take over editing *esperanto usa*. The job is not an impossible one; you'll have help (Don Coleman doing the local and regional reports; Jozef Truong providing youth news; Lusi Harmon with her travel reports; Ionel

Onet arranging for book reviews). Furthermore, if you don't feel that you can produce something of the technical quality that our members have become used to, I'm sure we can reach some kind of agreement whereby I will continue to do the grunge work of laying out pages, etc.; you'll "only" have to collect material and decide what will go into a particular issue and where it will go.

There will be two more (late) 1993 issues after this one, including the promised "Literary Supplement." I expect to take care of getting those out. I hope that a new editor will be in place for the first 1994 issue. If you are interested, please let me know at: P.O. Box 551, Pinole, CA 94564; (510) 222-0187 (evenings and weekends); donh@netcom.com.

Don Harlow



ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

La Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo prezentas la 10an Aŭstralian Esperanto-Somerlernejon, 10an-22a de januaro 1994, kaj la 30an Aŭstralian Esperanto-Kongreson, 16an-22a de januaro 1994, en Adelaide, Sud-Aŭstralio, ĉe Aquinas College. Por informilo kaj aliĝilo: SA Esperanto Society, 30 Westbury St., HACKNEY SA 50609, Aŭstralio, tel. (61 8) 362 5338.

La Kultura Esperanto-Domo Kastelo Grésillon en Baugé, Francio (en la malsupera Valo de Loire, tre bela regiono de Francio), jam starigis ampleksan programon por la somero de 1994j. Temas pri i.a. internaciaj amikaj renkontoj, kursoj por infanoj, instrukursoj por pedagogoj, ktp. Por plenaj informoj kaj kondiĉoj, bonvolu kontakti: Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, Kastelo Grésillon, 49150 BAUGÉ, Francio, tel. +33 41 89 10 34.

Nun haveblas Esperantlingva versio de la enkonduka libreto "The Mastery of Life" ĉe la Ordeno de la Ruza Kruco. Interesitoj povas mendi ĝin senpage de la Ordeno mem. Tiajn mendojn oni faru en la angla lingvo, kun mencio, ke temas pri la Esperanta versio. Kontakto: Rosicrucian Order, AMORC, Rosicrucian Park, 1342 Naglee Avenue, San Jose CA 95191, tel. 1-800-882-6672.

La Esperantlingva eldonejo, librovendejo kaj distribucentro Eldonejo & Librejo Sonorilo en Belgio nun akceptas plurajn kreditkartojn, nome Visa, EuroCard, MasterCard, Access*, Diamond Cards*, Million Cards*, Union Cards* (*nur se la simbolo de MasterCard staras je la signitaj kartoj), JCB Cards kaj American Express. Por la posedantoj de tiuj kreditkartoj ne plu

ekzistas transpagaj problemoj pri la mendo de libroj, video- kaj son-kasedoj, diskoj, kompakt-disko, eĉ abono de revuoj. Posedantoj de tiuj kreditkartoj simple sciigu per subskribita karto aŭ telefaksa letero ties numeron, validodaton kaj la nomon de la kreditkarto al: **Eldonejo & Librejo Sonorilo** vzw., **Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio, telefono + telekopiiilo +32/3/827.24.05.**

La Stipendio Ivo Lapenna, kiu subvencias kiel eble plej multaj disertacioj je universitata nivelo kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko, refoje estos aljuĝita en 1994 por disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en la jaro 1993. Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio bonvolu peti la detalan regularon de: s-ro **Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, DK-2720 VANLØSE, Danlando.**

Jurnalo *La Intersincera Kolektanto* estas asocioperiodaĵo de La Intersincera Kolektant-Asocio. Nun redaktas *La Kolektanta Adresaro de Esperanto* kaj varbas asocianojn: **Fu Guoqing, Dinajichang 10 Chejian, HARBIN 150040, Heilongjiang, Ĉinio.**

Raportas la Esperanto-Redakcio de Radio F.M.R. en suda Francio, ke ekde la 15a de oktobro, 1993, la novaj frekvencoj de la Radio estas 89,1 MHz en Toulouse kaj ĉirkaŭaĵo kaj 94,2 MHz en Montauban. La programo *Konektu Vin Esperante* aŭdiĝas ĉiuvendrede de la 16a ĝis la 17a horo laŭ loka tempo. *Noto por usonaj legantoj: ĉar temas pri FM-radio, tiu stacio certe ne aŭdeblas en Usono, sed vi nepre aŭskultu ĝin dum eventuala vojaĝo al suda Francio.* Por informoj: **Radio F.M.R., Esperanto-Redakcio, 9 bis avenue Frédéric Estebe, F-31200 TOULOUSE, Francio.**

Denove aperas la revuo *Eŭska Kverko*. Ĝi estas havebla kontraŭ abono de 15 nederlandaj guldenoj (proks. \$9) aŭ, por gejunuloj, senlaboruloj kaj nepagipovuloj, 9 nlg (proks. \$5.40). La abono kovras kvar numerojn de la revuo,

kiu aperas trionjare. Abonaj estas pageblaj aŭ pere de la UEA-konto de la eldonanto, kver-j, aŭ per internacia poŝtmandato rekte al la administrejo, kies adreso troviĝas malsupre. Interesatoj rajtas peti senpagan provnumeron. Abonantoj al E.K. ricevos senpage Kuspe, la oficialan organon de la Eŭska Esperanto-Asocio. Por informoj kaj abonoj: **Grupo Esperantista, Barrenkale Barrena 7-1, E-48005 BILBO, Hispanio.**

Zamenhof skribis: "Lingvo internacia havas la celon, krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri." Info-Servo celas ebligi kontakton inter ĉiuj, kiuj interesiĝas pri homaranismo. Tial ni preparas **Tutmondan Homaranistan Adresaron**. Se vi deziras registriĝi vian adreson en tiu ĉi adresaro, bonvolu sciigi vian adreson al: **Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-35037 MARBURG, Germanio.**

La Esperanto-Centro de Bangalore nun kolektas donacojn de esperantistoj por helpi al la suferintaj viktimoj de la septembra tertremo en Bharato, kiu lasis pli ol 30 000 homojn mortintaj kaj sendomigis aliajn milojn. Ĉekojn aŭ dratojn bonvolu ĝiri en la nomo de "Oxfam, India Trust" kaj sendi al: **Bangaloro Esperanto-Centro, 97, 3rd 3rd Block East, Jayanagar, Bangalore 560011, India.**

TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj), unu inter la plej novaj kaj aktivaj fakaj organizoj en Esperantio, eldonis la nulan numeron de sia trimonata bulteno *La Domo • Jarcento 21*. La organizo kaj la bulteno bezonas tutmondan kunlaboron de fakuloj pri konstruado. Kontakto ilin ĉe: **TAKE, RN 83—rue de Tiefenbach, FR-68920 WINTZENHEIM, Francio, tel. +33 89 79 79 92, telekopiiilo +33 89 79 79 93.**

DE IE MI MEMORAS LA NOMON: KION ĈIU ESPERANTISTO DEVUS SCII PRI LA LINGVO IDO

de Reg Reid kaj Rob Hardy

Preskaŭ ĉiu esperantisto scias iom pri la historio de sia lingvo, kaj por tio, scias iomete pri la finaskita lingvo Ido kaj la koncerna skandalo kiu ĝenis Zamenhof kaj la fruan esperantistaron. La cirkonstancoj, kiuj naskis la lingvon Idon, iĝis en la okuloj de la esperantistoj por ĉiam fifamaj; tamen, la afero estis ja interesa, kaj nepre meritas esploran rigardon de ĉiu esperantisto, por ke oni komprenu eĉ pli bone la lingvon kiun favoris Zamenhof. Jen priskribo pri la historio kaj la lingva karaktero de Ido.

Ekde ĝia komenco, oni volis ŝanĝi Esperanton. Zamenhof mem ricevis nekalkuleblajn leterojn kiuj rekomendis iajn ŝanĝojn. Li estis tre grandanima pri sia lingva projekto; kion ajn elektas la esperantistaro mem, estas bona ŝanĝo, sed nek li nek aliaj rajtas unuflanke insisti pri ŝanĝo.

Dum multaj jaroj post la enkonduko de Esperanto en 1887, Zamenhof esperis, ke ia aŭtoritata organizo ekrespondecos pri Esperanto. En 1900 du filozofoj proponis tian projekton. Ili estis L. Leau, kiu ne ŝajnas esti grava rolulo en la afero, kaj Doktoro Louis Couturat. Couturat estis grava franca esperantisto, intelekto brila, sed ne korvarma. Li skribis (kun Leau) erudician francan historion de Esperanto.

Couturat kaj Leau proponis, ke DelegacioporElektodeInternaciaLingvo kunvenu, kaj prezentu proponon al la Internacia Asocio de Akademioj. Eble per la aprobo de tiu Asocio, la mondo rapide akceptus internacian lingvon. Couturat iĝis la kasisto de la Delegacio, kaj Leau la sekretario. Zamenhof subtenis kaj kuraĝigis ilin. Esperantistoj kuraĝigis kaj varbis sciencajn societojn, ktp, kuniĝi kun la Delegacio.

Couturat certigis al Zamenhof, ke la Delegacio venigos nur bonon al Esperanto, sed la 2an de majo 1907, tiu ricevis strangan leteron de Charles Lemaire. Lemaire estis esploristo de la Kongo Belga, kaj esperantisto kiun tre amis Zamenhof, kiu nomis lin "la vera patro de

la belgaj esperantistoj". La letero proponis, ke Lemaire metos sin sub la dispono de Couturat, se Couturat mem "ne povos prezenti vian projekton al la Delegacio". La propono pri la mistera projekto ne akceptiĝis, sed montras, ke Couturat faris ian sekretan planon.

La 29an de majo, la Internacia Asocio de Akademioj kunvenis, diskutis la proponon de la Delegacio, kaj decidis ne agi. Couturat aranĝis elekton por Komitato de la Delegacio, Komitato el veraj eminentuloj. Unu el la reguloj de la Komitato estis, ke aŭtoro de lingva projekto ne rajtas mem esti membro de la Komitato. Ĉi tiu iomete stranga regulo vekis ian suspekton en Zamenhof, sed li elektis, kiel sian reprezentanton por Esperanto, Louis de Beaufront. Li estis memnomita markizo kiu studis lingvojn, filozofion, kaj teologion. Zamenhof konsideris lin granda amiko kaj bona esperantisto. Li estis tre fanatike konservatista pri la lingvo, kaj li ofte malĝentile riproĉis la herezulojn kiuj volis ŝanĝojn. Li opiniis, ke Esperanto estas nur lingvo, kaj malkonsentis kun Zamenhof kiam tiu proponis la ideojn de Homaranismo.

Estas strange, ke antaŭ kelkaj monatoj, de Beaufront penis persvadi kelkajn gravajn francajn esperantistojn akcepti "la reformojn kiujn la Delegacio proponos". Sed komence, li defendis Esperanton antaŭ la Delegacio, kaj aliaj reprezentantoj la aliajn projektojn. Couturat enkondukis anoniman projekton, nomitan Ido, kaj neis, ke li estas la aŭtoro. Ni poste montros kiel Ido similas kaj malsimilas Esperanton. De Beaufront ekdefendis Idon, kaj diris, ke tiu projekto plaĉos al la esperantistoj. Ŝajnis, ke de Beaufront kaj Couturat elektis prezenti siajn opiniojn dum kunvenoj kiujn ne ĉeestis Emile Boirac, bona amiko de Zamenhof.

Ferminte la teoriajn diskutojn, la Komitato elektis komisionon, por studi la detalojn de la alprenota lingvo, ĉar neniu

lingvo elektiĝis senŝanĝe. Post kiam li informiĝis pri la decidoj de la Komitato, Zamenhof sciis, ke li kaj liaj veraj amikoj "estas simple trompitaĵ". Tra la afero, li montris la kompaton kaj malavarecon al la trompantoj, eĉ post kiam ili disvastigis onidirojn kontraŭ li. La fina voĉdonado de la Komitato estis farsa afero, kaj nur kvar personaj voĉdonis por Ido: Couturat, de Beaufront, Leau, kaj Otto Jespersen. Tiu lasta estas mondrenoma profesoro pri filologio, kaj subtenanto de la ideoj de Esperanto. Li estis iĝonta la Prezidanto de la Ido-Akademio de 1907 ĝis 1910, kaj pasie disvastigis ĝin, komencante per la ĵurnalo *La Progreso*. En 1928 (ŝajnas, ke li estis kutima skismulo) li foriris de Ido, kaj eldonis sian planon por arta lingvo, ido de Ido, nomita Novial. Li verkis pri Ido la libron *La Historia di nia Lingvo* en 1912, kaj en tiu libro li bedaŭris la malmoralan konduton de de Beaufront (tiam supozata aŭtoro de la lingvo), kiu devus reprezenti nur Esperanton antaŭ la Delegacio.

Dume, en *L'Espérantiste* de majo, 1908, estis "Deklaro de Ido", kiu riproĉis la esperantistojn kiuj ne akceptis la avantaĝojn de Ido, kaj en kiu de Beaufront anoncis sin la aŭtoro de la lingvo. Neniu povas klarigi, ĉu de Beaufront aŭ Couturat estas la vera aŭtoro; oni kutime diras, ke ambaŭ kune laboris pri Ido. La Deklaro komencis serion da atakoj kontraŭ Zamenhof, krudaj kaj ofendaj. Kvankam la Ido-skismo kaŭzis al li multan suferon, Zamenhof restis pardonema, grandanima, kaj lia milda ekzemplo montris al la plejparto de la esperantistoj, kiel malaj je li estas la estroj de la idistoj.

Kun la atakoj estis propagando de Couturat por la nova lingvo. Oni starigis internacian organizon kaj elektis Akademion, kiu multe kaj detale esploris kaj ŝanĝis la lingvon, ĝis 1913, kiam oni proklamis "periodon de stabileco". Plue oni eldonis revuon "Progreso" (je 900 paĝoj ĉiujare!), kiu i.a. regule publikigadis decidojn kaj novajn decidojn koncerne

ŝanĝojn kaj plibonigojn de la lingvo.

En 1912 la "Uniono de amiki de linguo internaciona" havis proksimume 600 membrojn. Laŭ la *Bibliografio de Internacia Lingvo*, eldonita en 1929, ekzistis en la lastnoma jaro lerniloj en dudeko da lingvoj kaj la nombro de alispecaj publikigaĵoj originalaj kaj tradukitaj, plejparte ne multampleksaj, estis proksimume 100. De 1921 ĝis la komenco de la dua mondmilito okazis Ido-kongresoj kun modesta kvanto da partoprenantoj. La nombro da internacie organizitaj idistoj estis en 1930 proksimume 500.

S-ro P. Stojan en la ĵus nomita bibliografio resumis la historion de Ido ĝis 1928 tre koncize per jenaj frazoj: "Post dudekjara laboro kaj eldonado, per monofero de W. Ostwald, kiu donacis parton de sia Nobel-premio, la idistoj sukcesis krei serion da bonaj vortaroj, lernolibroj, modelaj tekstoj kaj ĝuste tiam klare montriĝis apatio de la publiko pri Ido, akompanata de interna krizo inter la idistoj mem. En 1927-28 parto da ili ekŝiĝis, parto transiris al la lingvo Occidental kaj Novial. La nombro da gazetoj en Ido falis ĝis 2 aŭ 3 anstataŭ 30 antaŭmilitaj..."

"El la plej brila 'plejado' da eminentuloj de 1908-13, universitataj profesoroj, famaj sciencistoj, filozofoj, restis neniu..."

Malgraŭ ĉi tiu malprogreso, post la dua mondmilito la Ido-movado reviviĝis, sed pri ĝia nuna amplekso mankas ciferoj. *Progreso* nun aperas tri aŭ kvar fojojn jare, je dudek paĝoj, kaj la Ido-Akademio denove publikigas en ĝi siajn decidojn. Krome aperas kelkaj landaj Ido-gazetoj.

La lingvo de la Delegacio estas kvazaŭ "ido" de Esperanto kaj kvankam oni multe ŝanĝis ĝin en la daŭro de ĝia modesta ekzisto, ĝi tamen ankoraŭ montras sian devenon. S-ro E. Drezen opinias, ke la plej gravaj diferencoj prezentas ne pli ol 15 procentojn de la tuta gramatika kaj vortara materialo, sed ŝajnas al mi, ke li taksis iom maltroe.

Ido ne havas supersignajn konsonantojn, sed anstataŭe la konsonantojn "q", "w", "x", kaj "z", kaj uzas la digramojn "ch" kaj "sh", same kiel la angla. Ankaŭ la diftongoj "au" kaj "eu" estas sen supersignoj. La "j" estas prononcata kie "zj", la "y" kiel "j".

La akcenton havas la antaŭlasta silabo

kun jenaj esceptoj: 1. Ĉe la verbo infinitiva la akcenton ricevas la finaĵo: "drinkar", "legar". 2. Se "i" aŭ "u" staras en la fino de la radikilo, ne estante ĝia sola vokalo, la akcenton havas la antaŭlasta vokalo rilate al ĝi: "famĵio", "historio".

La substantivo finiĝas je "o", sed plurale ĝin anstataŭas "i": "homoj" = "homi", "amikoj" = "amiki".

La adjektivo finiĝas je "a", la adverbo je "e".

La infinitivo havas tri formojn: "drinkar", "drinki", "drinkor". La lastajn du oni ne multe uzas.*

La tempoformoj, inkluzive de la kunmetitaj, estas kiaj en Esperanto, escepte de la imperativo, kiu, simile al la dua persono en la franca, finiĝas je "ez": "parolez!"

Krome eblas mallongigi la formon de la pasivo: "esti trinkata" = "esar trinkata" = (mallongige) "drinkesar"; "li estas laŭdata" = "ilu esas laudata" = (mallongige) "ilu laudesas".

Personaj pronomoj: "mi" = "me", "vi" = "tu" (aŭ "vu"), "li" = "ilu", "ŝi" = "elu", "ĝi" = "olu" (aŭ sen distingo de sekso: "lu" por ĉiu el la lastaj tri; "ni" = "ni", "vi" (plurale) = "vi", "ili" = "li", aŭ "ili" (vira), "eli" (ina), "oli" (neŭtra).

Posedaj pronomoj formiĝas per aldono de "a": "mea", "tua", ktp. La vortordo estas: subjekto, predikato, rekta komplemento. Ĉi lasta staras en la akuzativo kaj ricevas la finaĵon "n" nur, se la vortordo estas inversa: "la knabo, kiun vi vidas, estas mia frato" = "la puero, quan vu vidis, esas mea frato".**

La vortmaterialo de Ido estas parte egala al la Esperanta, sed pro la forigo de la supersignoj, pluraj vortoj havas alian ortografion ("horlojo", "mashino", "yaro") kaj pro alimaniere apliko de la principo de internacieco iuj radikoj estas anstataŭigitaj per tutaj aliaj ("muro" = "parieto", "birdo" = "ucelo", "fermi" = "klozar", "seĝo" = "stulo"). Plue, la "tabelvortojn" anstataŭas vortoj latindevenaj, kiaj: "omno" (= "ĉio"), "qua" (= "kiu"), "semper" (= "ĉiam"), ktp.

Ido grave devias de Esperanto koncerne la vortfaradon. Ĉi tio okazas laŭ iuj derivaj reguloj, kiuj en multaj okazoj malebligas la derivon rektan (per finaĵoj) kaj necesigas derivon nerektan (per afiksoj). Vortoj kiel "flami", "sangi", "kroni", "marteli", k.s. formiĝas en Ido per sufiksoj: "flamifar", "sangifar",

"kronizar", "martelagar".

Vortoj kiel "fumo", "esprimo", k.s., kiuj estas radike verbaj, formiĝas per la sufikso "ur": "fumuro", "expresuro".

En pluraj okazoj oni ne povas adjektivigi substantivon per anstataŭigo de la finaĵo "o" per "a", sed estas necese uzi sufikson. "Reĝo" estas la Ido "rejo", sed reĝa palaco estas "rejala palaco", ĉar "reja palaco" signifus "palaco, kiu estas reĝo". Same oni devas diri "gardenala" (ĝardena) pordo kaj "kordiala" (kora) saluto.

Aliajn substantivojn, kiel: "detalo", "kurajo" (kuraĝo), oni adjektivigas per la sufikso "oz": "detaloza" gramatiko, "kurajoza" homo.

De la adjektivoj oni derivas, anstataŭigante la "a" per "o", substantivojn, kiuj indikas personon, estaĵon aŭ aferon, kiu posedas la koncernan kvaliton aŭ econ. El la adjektivaj radikoj "forta", "granda", "fanatika", "dezerta", oni derivas "forto", "grando", "fanatiko", "dezerto", kiuj signifas: "fortulo", "grandulo", "fanatikulo", "dezerto".

Ido havas grandan kvanton da afiksoj, kiuj ebligas tre subtilajn distingojn, sed aliflanke malfaciligas la manipulado de la lingvo. Anstataŭ la prefikso "mal" Ido havas "des", sed por multaj tiel-nomataj "mal-vortoj" ĝi havas apartajn radikojn, kaj cetere ankaŭ por multaj aliaj vortoj, kiujn oni en Esperanto formas per afiksoj.

Sekvas fragmenteto el la fabelo "La Novaj Vestoj de la Reĝo", verkita de H.C. Andersen: unue, en Ido, kaj due, en Esperanto (tradukita de Zamenhof).

"Ho, Deo!" il pensis, "ka me esus stupida? Ton me nultempe kredis, e ton nulu darfis savar! Ke me ne esus apta por mea ofico? No, esus netolerebla, ke me dicas, ke me ne povas vidar la texuro!"

"Nu, vu ja dicas nulo pri to!" dicis unu del textisti. "Ho, to esas belega!"

"Tote charmiva!" dicis la olda ministro, regardante tra sua binoklo. "Ica desegnuro edica kolori! Yes, me dicis al imperiestro, ke ol plezas a me multege!"

"Mia Dio!" li pensis, "ĉu mi estas malsaĝa? Tion ĉi mi neniam supozis kaj tion ĉi neniu devas sciigi! Ĉu mi ne taŭgas por mia ofico? Ne, neniel mi povas rakonti, ke mi ne vidas la teksaĵon!"

"Nu, vi ja nenion diras!" rimarkis unu el la teksantoj.

"Ho, ĝi estas bonega, tre ĉarma!" diris

la maljuna ministro kaj rigardis tra siaj okulvitroj. "Tiu ĉi desegno kaj tiuj ĉi koloroj! Jes, mi raportos al la reĝo, ke ĝi tre al mi plaĉas!"

*Laŭdire, la du ekstraj formoj de la infinitivo en Ido estas lastatempe maloficialigitaj. [noto de la redaktoro]

**Laŭdire, la rajto uzi la -N en Ido estas lastatempe nuligita. Ĉu temas pri ĉiuj akuzativaj formoj, ĉu nur (kiel en la angla) pri substantivoj, tion mi ne scias. [n.d.l.r]

Kelkaj postaj komentoj de la redaktoro

Estas ĝenerala gvidlinio de *esperanto usa* ne aperigi artikolojn pri unuopaj aliaj artefaritaj lingvoj. Tamen, la artikolo de s-roj Reid kaj Hardy estis interesa, kaj cetere la historioj de Esperanto kaj Ido estas multe pli intime ligitaj ol tiuj de Esperanto kaj aliaj relative gravaj artefaritaj lingvoj; do mi opinias, ke la artikolo meritas aperigon.

Eble estas bedaŭrinde, ke la iom malhonestaj agoj (eĉ se bone motivitaj) de la kreintoj de Ido tiom venenis la interlingvan etoson post 1907. En la 1920aj jaroj kelkaj homoj provis aranĝi kompromison inter Esperanto kaj Ido, sed ĉar multaj el la esperantistoj de 1907 ankoraŭ aktivis, en tia etoso nenia kompromiso eblis. En la nuna tempo, kompromiso plu ne eblas pro du kialoj: (1) Esperanto fakte jam pruntis kelkajn el la malpli gravaj sed pli evidentaj proponoj de Ido (ekz. la [neoficialaj] sufiksoj -OZ-, -IF-, -IZ-, tuta serio da sinonimoj por la pli gravaj MAL-vortoj); (2) Kvankam en la 1920aj jaroj Ido havis eble dekone tiom da parolantoj, kiom tiutempe havis Esperanto, hodiaŭ la proporcio estas multe malpli granda, kaj tial ekzistas nenia instigo al ni esperantistoj kompromisi, aŭ eĉ atenti, la ekzistantajn idistojn.

Por pli bone kompreni la historian fonon, en kiu kreiĝis Ido, mi rekomendas al vi (se vi povas trovi la koncernajn librojn) la duvoluman *Leteroj de Zamenhof*, kiun kompilis Gaston Waringhien, kaj kiu aperis ĉe S.A.T. en 1948, kaj la eseon de Waringhian "Kulisaj Manovroj" en lia *Eseoj IV: 1887 kaj la sekvo*.

Daŭrigata de paĝo 4

